

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Matena preĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Profunda estas la silento  
 Ankoraŭ en la mondo ĉi!  
 La arboj nur en softa vento  
 Sin klinas kvazaŭ antaŭ Di'.

Mi sentas min kreita ree,  
 Mizer' kaj zorgo estas for.  
 Pro kio mi plendadis vee?  
 Mi hontas nun en la aŭror'.

Nur kiel pilgrimant' surtreti  
 Sinjor', la mondon volas mi,  
 Trairi ĝin kaj ĝoje preti,  
 Ĝis ree venos mi al Vi.

Se sentas en la kor' deziron  
 Pri vanta monda gloro mi,  
 Disbatu, Dio, mian liron  
 Kaj mi silentos antaŭ Vi.<sup>2</sup>

...

---

<sup>2</sup>aŭ:

Mi ĉiam mutos antaŭ Vi.

*Traduko de la Germana poemo "Morgengebet" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-164-1 / Arg-677-1362 (2012-11-24 22:29:52)*

*Pri la poeto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph\\_von\\_Eichendorff](http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff) respektive la germanan versio de vikipedio [http://de.wikipedia.org/wiki/Joseph\\_von\\_Eichendorff](http://de.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff).*